

Heinrich Heine,
Akvoveturo

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉe l' masto min apogis mi
kaj nombris ĉiun ondon.
"Adiaŭ nun, patrujo vi!²
Mi volas en la mondon."

Ekbrilis la fenestroj de
la karulina domo,
rigardis streĉe mi, sed ne
mansvingis iu homo.

Vi larmoj, retenigu vi,
por ke mi ne blindigu!
Malsana kor', pro tic ĉi
doloro ne rompiĝu!

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR-167-1 / Arg-208-1367 (2012-11-26 07:56:15)

Heinrich Heine,
Malseka veturo

tradukita de Manfred Ratislavo

Nombradis ĉiujn ondojn mi,
ĉe l' mast' min apogante.
Adiaŭ, kara vi patruj',
Veturas mi mallante.

Mi pretervenis ĉe la dom'
De mia karulino;
Sed rigardadas vane mi,
Ne mane svingas ino.

Vi larmoj, ho, retenu vin,
Ke mi ne eĉ blindigu,
Ke ne pro la tro granda ve'
La kor' en mi rompiĝu.

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-03-13.*

MR-114-1 / Arg-208-416 (2004-03-13 22:52:00)

La poemo troviĝas en la poemkolekto „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romancoj“, n-ro XIV.

²aŭ:

"Adiaŭ, kara vi patri'!"